

LA PONTO

Tweemaandelijks tijdschrift van de Limburgse Esperantovereniging.



Jaargang 7, nummer 1 (37) mei-juni 2014

Verschijnt op de eerste dag van iedere onpare maand.

Erkenningsnummer: P808228

V.U.: Pieter Jan Doumen, Peerderbaan 81, B-3940 Hechtel-Eksel

Tel. 011-73.20.47 – E-mail: pieter-jan.doumen@telenet.be

LA PONTO

Senpaga dumonata periodaĵo de la
Limburga Esperanto-Asocio (L.E.A.)

Aperas la unuan de ĉiu nepara monato.

Limdato por artikoloj : la 1-a de ĉiu para monato

Jarkolekto 7, n-ro 1 (37): majo-junio 2014

Ĉiuj antaŭaj numeroj ankoraŭ haveblas ĉe [http://
esperanto-forum.net/doc/LaPonto/archief.html](http://esperanto-forum.net/doc/LaPonto/archief.html).

Redaktoro: Pieter Jan Doumen, Peerderbaan 81,

B-3940 Hechtel-Eksel - Tel. 011-73.20.47

Retadreso: pieter-jan.doumen@telenet.be

Redaktore...

Karaj Gelegantoj,

Komence de la plej bela sezono en okcidenta Eŭropo vi ricevas la 37-an numeron de La Ponto kun pluraj interesaj artikoloj.

De "La plua historio de Esperanto" vi povas legi la 10-an kaj lastan parton.

Tre interesan artikolon vi trovas ĉi tiepri parolhandikapitaj personoj, kiuj kapablas paroli kaj skribi helpe de specialaj komputiloj!

Ne ĉiuj esperantistoj konas ILEI, la organizaĵo de la Esperanto-instruistoj, kiu formas kapablajn instruistojn en la tuta mondo.

Per alia artikolo vi povas konatiĝi kun Lillo, la franca urbo, kie okazos la venontjara centa Universala Kongreso kaj kiu situas je kelkaj kilometroj de la franca-belga limo en la franca Flandrio, parto de la iama potenca kaj prospera grafejo Flandrio inter la Norda Maro kaj la rivero Skeldo, kiu nun troviĝas en tri ŝtatoj. La tria parto troviĝas en Nederlando.

Mi deziras al vi agrablan legadon.

Pieter Jan Doumen

Plua historio de Esperanto (10)

Verdere geschiedenis van het Esperanto (10)

16. Necesaj postuloj al internacia lingvo

Centoj da projektoj de universala lingvo aperis en la daŭro de la tempoj, sed el ili nur unu sola, Esperanto, sukcesis akiri daŭran uzadon kaj disvastigon. Kio do povas esti la kaŭzo de la sukceso de Esperanto kaj la malsukceso de la aliaj projektoj?

Estas klare, ke en tempo kia la nia, kun ĝiaj internaciaj trafiko kaj komerco kaj kun rapida interkomunikado inter ĉiuj landoj kaj popoloj, lingvo, kiu volas servi kiel universala kaj internacia komprenigilo, devas esti ne nur kodo aŭ iaspeca signa lingvo, sed vera lingvo, uzebla kaj skribe kaj parole.

Sed ankaŭ ne iuspeca parolebla lingvo taŭgus, ĉar ĝi ne povas esti la lingvo de unu aŭ alia popolo, kiu tiamaniere havus tro grandan avantaĝon antaŭ ĉiuj aliaj popoloj.

Tre multaj vortoj estas egalaj en ĉiuj kulturaj lingvoj. Ili estas la t.n. internaciaj vortoj (ekz. telefono, koncerto, teatro, universala). Lingvo, kiu pretendas esti universale uzebla, kompreneble devas esti bazita ĝuste sur tiu ĉi fakto, tiel ke ĝia vortprovizo estu en kiom eble plej alta grado *internacia*.



Antaŭ la naskiĝdomo de Zamenhof en 1937.
De m.d. : Sofia Zamenhof, filino ; Ludoviko, nepo,
filo de Adam Zamenhof, Lidja Zamenhof, filino

Sed samtempe la lingvo devas esti *facile lernebla* por ĉiuj homoj, instruitaj kaj neinstruitaj. Tial ĝia gramatiko devas esti *regula* kaj *simpla*, sen la multaj esceptoj kaj senbezonaĵoj kaj reguloj de la naturaj lingvoj. Oni ankaŭ ne bezonu lerni tro multajn vortojn, sed samtempe la lingvo estu kapabla esprimi ĉiujn ideojn kaj pensojn de la modernaj homoj. Tial la vortfarado devas esti *sistema* kaj la tuta lingvo *logike aranĝita*.


Plue oni devas postuli, ke la universala lingvo estu *facile prononcebla*, ke en ĝi ne ekzistu sonoj malfacilaj por iu aŭ alia popolo, kaj ke ĝi devas esti *fonetike skribata*, tiel ke ĉiu litero ĉiam estas egale prononcebla, kaj ĉiu sono ĉiam egale skribata.

Fine la lingvo devas esti belsona por ke ĝi estu agrabla en la uzado.

Esperanto estas la sola lingvo, kiu respondas al ĉiuj tiuj postuloj. En la sekvanta ĉapitro ni rigardu la ĉefajn trajtojn de ĝia konstruo.

17. La konstruo de Esperanto

En sia privata letero al Borovko Zamenhof rakontas, kiel li alvenis al la principoj, laŭ kiuj Esperanto estas konstruita. Montriĝas, ke lia ideo trapasis la saman vojon, laŭ kiu la ideo de universala lingvo ĝenerale evoluis dum la tempo. Tiel li unue pensis pri unu el la naturaj lingvoj kiel internacia lingvo, poste li revis pri



revivigo de la latina aŭ antikva greka lingvo por tiu rolo, sed pro la antaŭe menciitaj motivoj li baldaŭ forlasis tiujn ideojn kaj decidis konstrui tute artefaritan lingvon, kun arbitre elpensitaj vortoj. Sed baldaŭ li komprenis, ke tiaj vortoj estis treege malfacile memoreblaj, kaj do fine li konvinkiĝis, ke la universala lingvo devas esti nova, neŭtrala lingvo, bazita sur la ekzistantaj lingvoj.

Kiam li eklernis la anglan lingvon, li vidis ke la gramatiko de la lingvo povas esti tute simpla. Tial la gramatiko de Esperanto estas reduktita ĝis la minimumo. Ne ekzistas esceptoj al la malmultaj simplaj reguloj.

Zamenhof baldaŭ rimarkis la internaciecon de multaj vortoj, kaj li penis elekti por ĉiu vorto la plej internacie konatan formon. Kaj kiam li ekatentis pri la grava signifo de afiksoj (prefiksoj kaj sufiksoj, li enkondukis tiun tre praktikan principon en la lingvon. En Esperanto ekzistas 35 sufiksoj kaj proksimume 10 prefiksoj, per kiuj oni povas formi multegajn novajn vortojn el unu radiko. Cetere ankaŭ prepozicioj kaj aliaj vortoj estas uzablaj kiel prefiksoj. La sistema aplikado de ĉi tiuj afiksoj do konsiderinde malgrandigas la nombron de necese lernendaj vortradikoj. Sed ankaŭ la afiksoj estas konsiderataj kiel memstaraj vortoj. Kunmetita Esperanta vorto konsistas nur el senŝanĝeblaj memstaraj elementoj. Oni diras, ke Esperanto estas *aglutina* lingvo. Tiu ĉi karaktero de la lingvo estas tre grava, ĉar pro ĝi la vortfarado estas tute regula.

Fine Zamenhof tre saĝe aranĝis la alfabeton de sia lingvo. Li uzis nur kvin vokalojn (a, e, i, o, u), kiujn ĉiu povas klare prononci. En la eŭropaj lingvoj kelkaj konsonantoj (c, g, j kaj aliaj) estas diverse prononcataj. Per la supersigno Zamenhof donis al tiuj konsonantoj duan

prononcon, tiel ke li ne bezonis multe kripligi la aspekton de la internaciaj vortoj, kaj samtempe li povis konservi la principon de la fonetika skribado de la vortoj. Ekz. en la franca vorto *gorge* la du literoj g estas malsame prononcataj; en Esperanto tiu vorto fariĝis *gorĝo*. Cetere en la esperanta vorto *ĝardeno* anglo rekonas per la okulo sian *garden*, franco per la orelo sian *jardin* kaj italo per la okulo sian *giardino*.

Esperanto ne estas "artefarita" lingvo. Ĝi estas bazita sur la ekzistantaj naturaj lingvoj. Ĝi konsistas el "naturaj" elementoj, kiuj estas nur sisteme ordigitaj kaj aranĝitaj. D-ro Zamenhof simple elektis la necesajn utilajn trajtojn kaj elementojn el la ekzistantaj lingvoj, forĵetante ĉion superfluan kaj neregulan.

Laŭ C. Stöp-Bowitz kaj G. Isbrücker (1948)

Novajoj el Esperantolando

(Nieuws uit Esperantoland)

Ukrainio – *La politika krizo kaj Esperanto* –

Loĝantoj de Rusio kaj Ukrainio havas grandajn problemon, se ili volas viziti EU-landojn, kie historie okazas multaj gravaj E-eventoj. Ĉio iĝas pli kaj pli malfacile. La ŝtatoj pli kaj pli striktigas la regulojn de tiaj vojaĝoj. Se nuntempe, por ekz., civitano de Rusio volas partopreni en iu E-kongreso en EU, li devas trapasi multajn formalajn procedurojn, elspezi multe da tempo kaj mono, humiliĝi antaŭ la diversaj ŝtataj instancoj. Same loĝantoj de EU havas multajn problemojn por viziti Rusion. Post tiu ĉi konflikto en Ukrainio tio iĝos ankoraŭ pli malfacile. Pro tio stagnas la internacia komunikado dum E-aranĝoj en Rusio.

Dum 2014 en Ukrainio (ankaŭ en Krimeo) estas planataj minimume 5 relative grandaj internaciaj E-aranĝoj kaj pluraj malpli grandaj. Verŝajne ili estos plejgrandparte nuligitaj, sed eĉ se iuj el ili okazos, esperantistoj el Rusio kaj EU povus apenaŭ veni tien pro la nunaj cirkonstancoj.

Kio okazos al la unua rusa SES, kiu estas planita por aŭgusto apud Moskvo kaj al aliaj E-aranĝoj? Neniu nun povas prognozi tion. Tamen mi ial pensas, ke nenio bona...

Pro tiu ĉi konflikto ordinaraj homoj (do ankaŭ esperantistoj) en Rusio kaj Ukrainio draste malriĉiĝas. Tio signifas, ke ili havos malpli da monrimedoj kaj tempo por la regiona E-movado kaj vojaĝoj eksterlanden. Nuntempe tio okazas plej akre en Ukrainio, kiu troviĝas sur la sojlo de la ekonomia kolapso. Tamen "eĥo" aperis ankaŭ en Rusio. Ekz. nur dum la du

pasintaj monatoj la rublo malplikostiĝis je 10-15%, kompare al la eŭro kaj la dolaro. Kaj tio estas nur la komenco... Do tio signifas, ke se iu rusia esperantisto ekvolus nun veturi al iu eŭropa E-aranĝo, li devus elspezi 10-15% pli, ol antaŭ du monatoj !

Same ricevas grandan baton la eĉ sen tio jam malforta esperanto-infrastrukturo. Ekz. pro la falo de la rublo la prezoj de la libroj kaj lernolibroj de Esperanto kreskegas, sed esperantistoj ne havas la eblecon pagi ilin pli koste. Krome, nia eldonejo *Impeto* estas la plej granda liveranto de esperantaj lernolibroj kaj vortaroj por Ukrainio. Mi dubas, ĉu pro tiu ĉi krizo novaj Esperanto-lernantoj en Ukrainio povos ricevi la bezonatajn studmaterialojn dum la venontaj monatoj.

Dima Sevĉenko

Belgio – Alternativa muzikfestivalo

La Semo estas muzikfestivalo kiu okazos en Enghien-Edingen la 11-an, 12-an kaj 13-an de julio. Jen la retejo <http://www.lasemo.be/2014/> (atentu : ĝi estas iom peza pro la fotoj !). Estas la sepa okazaĵo. Ekde la komenco la muzikfestivalo havis nomon en Esperanto. Kvankam la organizantoj ne parolas nian lingvon, ili trovis tiun ideon moĝosa. Ni kontaktis ilin lastjare kaj partoprenis en la organizado..

Enghien-Edingen estas malnova, eta urbo en Henegovio proksima de Bruselo, atingebla trajne kaj dulingva (franca-nederlanda)... Estas kontrakto inter la urbo kaj la festivalo por pluraj jaroj. Enghien havas grandegan parkon, kie okazos la festivalo.

Temas pri alternativa muzikfestivalo. Oni tre atentis pri daŭripova disvolviĝo (ekz. uzado de reuzeblaj glasoj), pri infanoj (ludejoj por ili, speciala tendejo por familioj), proponas lokon por sociaj ludoj, estas komplete vizitebla por rulseĝuzantoj, ktp.

Lastjare dum la tri tagoj partoprenis 20.000 vizitantoj, el kiuj 1000 infanoj (tio signifas, ke iu kiu partoprenis la tri tagojn, faris tri vizitojn). La festivalo estas ĉefe por franclingvanoj, sed partoprenis ankaŭ kelkaj flandroj lastfoje, sed oni volas pli reklami en Flandrio kaj Francio.

La Semo signifas la semo en Esperanto. Per kelkaj frazoj oni eksplikis kio estas Esperanto, laŭ mia memoro senerare. La lastjara temo de la vilaĝo estis ankaŭ en Esperanto : *Agir ensemble – agi kune*. Ni povos senpage havi budon en la muzikfestivalo kaj 9 senpagajn enirbiletojn (por 3 homoj ĉiutage), unu senpagan parklokon, senpagan lokon en la

tendejo. La budotendo ni devas prunti de la Federacio Valonio-Bruselo. Sed organizi kaj krei budon estas grandega laboro. Jam estas realigita laboro la antaŭan jaron, sed restas ankoraŭ multege da laboro ! Ni havas bonegan rilaton kun la aliaj asocioj. Lastjare mi tradukis la panelojn de unu alia asocio.

Valère Doumont

Hungario - Konkurso de Esperanto-muziko
TEJO kaj ĝia revuo *Kontakto* anoncas konkurson pri novaj Esperantaj kantoj kaj muzikaĵoj. Unu el la premioj estos aljuĝita laŭ publika voĉdonado ! Danke al la moderna teknologio multaj homoj havas la eblon verki kaj mem registri Esperantan muzikon kaj kantojn. Pro la bunteco de la muzika ĝenro ĝi ne plu estas traktata, ekde la pasinta jaro, kiel branĉo de la tradiciaj Belartaj Konkursoj de UEA, sed estas organizata kiel aparta Muzika Konkurso sub la ŝildo de TEJO.



La muzikan konkurson teknike organizas la revuo *Kontakto*, sed ĝin subtenas UEA kaj la esperanta muzikeldonejo Vinilkosmo. La konkurso havas du kategoriojn: "Kanto de la Jaro" kaj "Albumo de la Jaro". Iu ajn rajtas partopreni en ĝi, ankaŭ per memfaritaj aŭ neeldonitaj registraĵoj.

La konkurso aljuĝos tri premiojn. La unuan kaj la duan premiojn aljuĝos la ĵurio. La trian premion aljuĝos la publiko per publika voĉdonado. La unua laŭreato de la "Kanto de la Jaro" ricevos € 200, la dua € 100, kaj tiu juĝita de la publika € 100. La konkurso "Albumo de la Jaro" premios unu konkursaĵon, kiu ricevos € 200. La limdato de la alsendo de konkursaĵoj estas la 31-a de majo de ĉiu jaro. La kontaktadreso estas muzikakonkurso@tejo.org.

Regularo kaj aliĝilo estas troveblaj ĉe : <http://kontakto.tejo.org/p/regularo-de/html>

Silvási László, Ret-Info



Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI) (*Internationale Bond van de Esperanto-leraars*)

En la mondo ekzistas laŭtakse inter 6000 kaj 7000 lingvoj, sed malaperas averaĝe po unu ĉiusemajne. Ĉiu lingvo estas esenca esprimilo de kulturo kaj identeco de popolo. La morto de lingvo limigas la riĉecon de nia mondo tute kiel la estingo de biologia specio.

Justeco postulas por ĉiuj homoj la rajton konservi sian propran lingvan heredaĵon : la lokan, ŝtatan aŭ nacian lingvon, kaj uzi internacian por transnaciaj kontaktoj. Ni bezonas neŭtralan solvon por internacia uzo, kiu protektas la daŭran ekziston de malpli parolataj lokaj kaj naciaj lingvoj. Esperanto estas tiu solvo.

Esperanto estas la ideala ilo por unuigi homojn strebantajn al paco kaj daŭra evoluo. Ĉar preskaŭ ĉiuj ĝiaj parolantoj konscie decidis uzi tiun lingvon, ili sekve emas esti jam internacie orientitaj kaj socie engaĝitaj.

Esperanto estas 'genia sintezo' de la plej bonaj elementoj tiritaj el vasta gamo de lingvoj, ellaborita por ebligi la komunikadon inter la popoloj de malsamaj landoj kaj kulturoj. Danke al sia preciza kaj regula strukturo, ĝi estas pli facile lernebla ol la etnaj lingvoj. Kontraŭe al tiuj ĉi, ĝi permesas egalnivelan komunikadon inter la popoloj, ĉar ĉiu faris la klopodon ĝin lerni. Kreita en 1887 de D-ro L.L. Zamenhof kaj uzata en pli ol 125 landoj, ĝi klare kontentigas la deziron de kontakto de tiuj kiuj volas komuniki kun homoj de aliaj kulturoj sen dependi de interpretistoj aŭ de ia hegemonia lingvo. Ĝia vasta uzado dum internaciaj konferencoj ebligas la partoprenantojn pli bone atenti pri la enhavo de la referaĵoj ol

pri la pli-malpli bone komprenataj trudataj naciaj lingvoj.

Esperanto evitas homonimojn, vortojn kun malsamaj eblaj prononcoj kaj plursignifajn vortojn; ĝi evitas vortojn, kiuj plenumas diversajn gramatikajn funkciojn senmodife, kiel ekzemple la angla la vorto 'round', kiu povas roli kiel substantivo, adjektivo, adverbo, prepozicio aŭ verbo.

Esperanto markas la gramatikan rolon de la vortoj: -o por substantivoj, -a por adjektivoj, -e por adverbo, -as, -is, -os, -us, -u por la diversaj tensoj de la verboj. Sekve la frazanalizo facilas kaj la intencata signifo estas klara.

Ĉiuj el la 28 literoj de la alfabeto reprezentas nur unu sonon. Ne ekzistas silentaj literoj. Tio liveras granda tempoŝparon en lerneja studplano: literumado simple ne forkonsumas amason da horoj, kiel tio okazas ĉe malpli fonetikaj lingvoj kiel la angla kaj la franca.

Danke al la supraj karakterizoj Esperanto estas lernebla ĝis uzebla grado por la grandega plimulto de la popoloj de la mondo – lingva kapablo kaj kosto apenaŭ formas baron. Studo montras, ke ĝi estas inter 5 kaj 10-oble pli facile lernebla ol aliaj lingvoj.

Ĉeestanta en 55 landoj kun 35 sekcioj, ILEI donas transnacion profesian bazon el instruistoj kiuj parolas Esperanton. Ĝi celas krome akceli la instruadon de Esperanto, kaj en lernejoj kaj pere de la interreto, trejni instruistojn, okazigi ekzamenojn, eldoni modernajn lernilojn kaj kunigi kaj organizi instruistojn de Esperanto kaj iliaj lernantoj.

La Ligo aperigas du revuojn: la oficialan *Internacia Pedagogia Revuo* por la instruistoj kaj instruantoj kaj *Juna Amiko* por lernantoj. ILEI organizas ĉiujaran konferencon kun fakaj, organizaj kaj distraj programeroj. Listo de la lastatempaj konferencoj atestas pri la kreskanto internacieco de la ligo: 2006 Parma (Italio), 2007 Ranzan (Japanio), 2008 Porto Novo (Benino), 2009 Krakovo (Pollando), 2010 Matanzas (Kubo), 2011 Kopenhago (Danlando), 2012 Kuning (Ĉinio), 2013 Herzberg-Sieber (Germanio), 2014 Montevideo (Urugvajo).

Niaj programoj ebligas al infanoj el malsamaj landoj malkovri la kulturojn unuj de la aliaj danke al komuna lingvo: plurdekoj da tiaj projektoj estis realigitaj kadre de la Eŭropaj programoj *Comenius* kaj *Grundtvig*.

Por pli da informoj kontaktu la prezidanton, ĉe : ilei-prezidanto@gmail.com ,

Stefan Mac Gill



Paroli kaj skribi helpe de i-Pado (Praten en schrijven met een i-Pad)

An Olijslagers, membro de LEA, laboras por firmao, por kiu ŝi konstruas interkomunikiĝajn aparataron por parolhandikapitaj personoj, la t.n. “locked-in” personoj

Sur la televidilo iu loĝanto de Uden (N I), Herman Visser (48. j.), iam vidis dokument-filmon pri homoj kun la tiel nomata *locked-in*-sindromo, t.e. personoj kiuj estas enfermitaj en si mem. Tio kondukis al la starigo de lia entrepreno HE Servis. En 2010 li transprenis la entreprenon Commap (pron.: Kómmap), kiu konstruas interkomunikiĝajn aparatojn. Per ambaŭ entreprenoj li provas helpi personojn kiuj suferas pro grava parolĝeno. Fakte tiuj aparatoj estas plilongigaĵoj de la flegantoj.

“La problemoj estas tre diversaj. Estas personoj kiuj suferas pro afazio¹. Sekve de apopleksio aŭ cerbinfarkto ili ne plu povas paroli aŭ tre malfacile. Por ili mi konstruas aparataron kiu ebligas ilin komuniki kun sia ĉirkaŭaĵo”.

Li montras malgrandan komputilmodelon kun pluraj bildetoj sur la ekrano. Li premas sur bildeton de taso da kafo, kaj voĉo diras: “kafo”. Tiel la uzanto de la aparato povas sciigi al sia ĉirkaŭantaro, ke li deziras havi kafon. Sed estas ankaŭ aparatoj kiu ŝanĝas tajpitan tekston en parolon.

Locked-in signifas enfermita en sia korpo. La paciento estas plene konscia, sed ne povas moviĝi. Ofte palpebrumado per okuloj estas la sola rimedo de komunikado. Visser:

“Mi vidis kiel knabo kun la *locked-in*-sindromo skribis libron. Iu sidis antaŭ li kaj diris:

unua linio, (dua linio, tria linio), unua litero (dua litero, tria litero k.t.p. Palpebrumante la paciento indikis la deziratan leteron, kaj tiel, literon post litero, ekestis la libro.

“Mi laboris en la industria aŭtomatigado kaj pensis: ‘Tio devas eblu en pli facila maniero’. Kaj tiel ĉio komenciĝis.”

Li gluis glumarketon sur okulo de virino kun la samspeca sindromo kaj metis apude kameraon kiu estis ligita kun klavaro. Tiel la paciento mem povis tajpi.

Pro sia laboro Visser ĉiam pli ofte vizitis reaktivigejojn en kiu restadis personoj, kiuj estis tre grave handikapitaj sekve de muskol-malsanoj, gravaj cerbinfarktoj aŭ post komato. Interkonsiliĝante kun kuracistoj, li malkovris la specifajn bezonojn de la pacientojn. Tial li provas helpi ilin per sia entrepreno.

Unu el liaj aparatoj estas la *Lightwriter*, speco de klavaro kun du bildekranetoj: unu por la uzanto kaj unu por la persono kiu sidas kontraŭ li. La tajpita teksto estas montrata sur ambaŭ bildekranetoj kaj samtempe transformata en sono. “Kelkaj aparatoj estas eĉ uzeblaj kiel poŝtelefonoj,” li diras..

Lia lasta inventaĵo estas speciala aplikaĵo – la *DuoPraat* –, kiu povas esti elŝutata sur tableton. Ĝi fakte funkcias kiel la *Lightwriter*. La sola diferenco estas, ke la pacientoj plej ofte povas uzi sian propran tableton.

“Bedaŭrinde tio ne eblas por ĉiuj tabletoj. La enigarda angulo devas esti bona,” diras Visser. “Kondiĉo por la aplikaĵo estis, ke ĝi ne povas esti tro komplika por maljunuloj. Ni ankaŭ instalos ĝin por ili, se ili mem ne povas fari tion. Kaj se ilia tableto ne taŭgas, ni pruntedonas unu taŭgan al ili.”

Laŭ Visser la aparataro estas ankaŭ perfekte uzebla en la sekcio intensiva zorgo, kie la homoj ofte ne plu povas paroli, ĉar troviĝas diversaj tubetoj en ilia gorĝo.

“Ĉe tiu laboro ofte ekestas forta emocio. Ofte la bezono de la pacientoj estas tre alta. Ili multe ĝojas, ke ili povas komuniki, sed ili ankaŭ konscias, ke tio estas por ili la sola ebleco.

Dylan den Brok (35 j.) suferas de la sindromo de Down. Paroli kun li preskaŭ ne eblas. Dylan sidas sur la kuireja planko, ludante per siaj bloketoj.

“Venu, Dylan, ni volas iomete labori per la komputilo” diras lia patrino Marianne, metante specialan iPadon sur la tablon. Dylan grimpas sur seĝon kaj komencas entuziasme frapeti sur la bildekranon.

¹ Greka vorto kiu signifas: ‘ nekapableco paroli.



Dylan den Brok kun sia patrino

“Ho, ho, ne tiel entuziasme,” diras lia patrino. “Kion ni baldaŭ faros?” ŝi demandas.

Dylan frapetas sur bildon.

“Trinki kafon,” diras voĉo en la iPado.

Dylan denove frapetas.

“Naĝi”, diras la iPado kaj ”Ekzerci kun Femke.”

“Tio estas lia logopedistino,” klarigas lia patrino.

Dylan “laboras” jam du monatojn per la Mobi 2, kiel oficiale nomiĝas la aparato.

“Por nia Dylan, malfermiĝis nova mondo,” diras Marianne den Brok. “En la daŭro de la tempo li kreis sian propran gestolingvon. Ni bone komprenas lin, sed ni bezonis ion per kio ankaŭ aliaj povas kompreni lin.”

Ŝi rakontas, ke ne plaĉis al Dylan, ke la tuta familio disponas pri iPadoj, sed li ne.

“Tiam ni serĉis ion por li. Ni telefonis al asekuranto CZ, kaj tiu donis al mi la numeron de Commap en Uden. Kaj tiel la afero estis aranĝita. Dylan devas ankoraŭ lerni pli bone labori per la iPado. Iom post iom ni progresas. Ni ĉiam aldonas kelkajn novajn bildojn. La homoj ofte pensas, ke li frenezas, sed li komprenas pli, ol ĉiuj kredas. Problemo estas, ke li malbone vidas. Sed tiu ĉi aparato estas bona solvo por ĉiuj.”

El ‘Brabants Dagblad’, Nederlando

La Universala Kongreso 2015 Lillo *Het Wereldcongres 2015 in Lille*

La nord-franca urbo Lillo akceptos la centan Universalan Kongreson de Esperanto de la 25-a de julio ĝis la 1-a de aŭgusto 2015. Lillo

estas la ĉefurbo de la franca departemento Nord kaj de la regiono Nord-Pas-de-Calais.

La evento okazos en la Granda Palaco de Lillo, kiu povas akcepti ĝis 5000 partoprenantojn kaj situas en la komerca kvartalo Euralille je nur kelkaj minutoj piede de la stacidomo kaj de la centro.

Lillo situas apud la belga limo je malpli ol unu horo de Parizo, je 35 minutoj de Bruseloj kaj du horoj de Limburgo. La kongreso estas do unika okazo por la belgaj esperantistoj plibonigi sian parolkapablon de Esperanto kaj konatiĝi kun esperantistoj el la tuta mondo.

Lillo situas je 25 km de la belga urbo Kortrejko. Kun la regiono Kortrejko-Muskrono Lillo en pli larĝa senco konsistigas tre dense enloĝatan regiono kun preskaŭ du milionoj da loĝantoj.

Ekde la mezepoko Lillo estis grava industria urbo (tekstilo). Ĝi havas universitato kun kvar kampusoj kaj entute 110.000 studentoj kaj gravan regionan funkcion.

La urbo estis fondita kun la latina nomo *Ad Insulam* (insulo en la rivero Deŭlo), kiu estis tradukita en la malnovan francan kiel *à l’isle* (pron.: a lil) kaj en la flandran lingvon kiel *ter ijssel* (pron.: ter isel), kio donis en la moderna franca *à Lille* kaj en la flandra *Rijsel*.

Ĉar la franca nomo multe similas al la latina vorto *lilium* (lilio), ekde 1199 oni vidas lilion sur la blazonŝildo de la urbo. La nomo Rijsel estas nuntempe uzata nur en Flandrio.

Lillo estis fondita en la 11-a jarcento de la flandra grafo Boudewijn V en insulo en la rivero Deŭle. Rijsel fariĝis la ĉefurbo de la suda parto de la grafejo Flandrio, kiu etendiĝis sur granda parto de nord-okcidenta Francio.

En 1297 la urbo estis konkerita de la franca armeo post akraj bataloj, dum kiuj la loĝantoj sendis porkojn por rompi la francan atakon.

Post la batalo ĉe Pevelenberg en 1304 Lillo fariĝis parto de Francio kun la resto de pikardia Flandrio ĝis en 1369, kiam Filipo la Temerara, duko de Burgondio kaj grafo de Flandrio, ricevis la regionon kiel geedziĝan donacon.

En 1667 la urbo estis sieĝata kaj konkerita de la franca reĝo Ludoviko XIV. Post la Franca Revolucio de 1789 la urbo, kiu situis en la frontlinio estis atakata ekde la aŭstraj Nederlandoj (la nuna Belgio). La sieĝo malsukcesis, kaj la franca generalo Dumouriez profitis de la okazo konkeri la aŭstrajn Nederlandojn.

En la 19-a jarcento Lillo kaj la ĉirkaŭanta

regiono spertis grandan kreskon de la loĝantaro danke al la industriigo, precipe la tekstilindustrio, kiu altiris multajn enmigrantojn, precipe el Flandrio kaj Pollando.

Dum la Unua Mondmilito la urbo multe suferis pro la germanaj bombardoj. Granda parto de la urbo estis detruita de incendioj. La disfalo de la tekstilindustrio en 1927 kaŭzis grandan povrecon. Kiam post 1980 nova krizo en tekstil- kaj metalindustrio kaj la ĉeso de la karb-elfosado en la departemento Nord kaŭzis enorman senlaborecon, la urbo elektis la servadindustrion. En 1962 la urbo havis ĉirkaŭ 241.000 loĝantojn. De 1962 ĝis 1982 tiu nombro malkreskis ĝis 168.000, sed ekde 2000 ĝi denove kreskas.



Borso de Lillo de 1652 (flandra arkitekturo)

Lillo estas grava nodo de aŭtovojoj, akvo-vojoj kaj fervojoj, danke al kio la urbo jam ĉiam estis grava ekonomia centro. Nuntempe turismo ludas gravan rolon. 125 hoteloj ricevas la turistojn. En 2004 9 milionoj da turistoj vizitis la urbon, kaj 1,4 miliono da turistoj tranoktis tie 2,4 milionfoje.

Vidindaĵoj : la komercĉambro kaj belfrido ĉe la Placo de la Teatro ; la Placo Charles de Gaulle, ankaŭ nomata Granda Placo, kie ankaŭ troviĝas la malnova Borso ; la naskiĝdomo de Charles de Gaulle, kiu nun estas muzeo ; la neoklasika Operejo, ekuzata en 1924, kun salono por 1000 spektantoj ; la urbodomo (hôtel de ville) kun belfrido kaj turo de 100 m alta (400 ŝtupoj). (Laŭ la interreto)

Faru vian amteston !

Doe uw liefdestest!

Ĉu vi ne havas partneron kaj faras al vi demandojn pri tio? Kial mi enamiĝas al tiu unika persono kaj ne al alia ? Mi estas tute normala, sed tamen ne sentas papiliojn en mia ventro ! Laŭ la usona antropologo Helen Fisher altiro dependas de via amtipo. Per tiu ĉi artikolo vi povas ekscii, kiu amtipo vi estas.

Iuj homoj enamiĝas al *egalhumoraj* personoj, aliaj sentas sin bone ĉe *kompletigaj* karakteroj, ankoraŭ aliaj kun tute *kontraŭaj* personecoj. La kaŭzo de tio estas tute alia afero ol la sorto !

Kemiaj materietoj difinas vian enamiĝon ! Helen Fisher esploris la terenon de la amo. Ŝi konkludis, ke la sekvantaj neŭrotransmetantoj ludas gravan rolon ĉe tiuj sentoj : *dopamino*, *testosterono*, *estrogeno*, *serotonino*. Ni ĉiuj posedas tiujn ĉi materietojn en granda aŭ malgranda kvanto. Sed estas precize la kvanto kiu difinas, kiel vi spertas enamiĝon kaj kion vi serĉas en via partnero.

Helen testis sian teorion ĉe miloj da personoj, kio permesis al ŝi dividi la homojn en kvar amtipojn. Ĉiun tipon karakterizas unu el la kvar materietoj, kiuj regas nian korpon. Ĉiu el la kvar amtipoj ricevis nomon kiu akordas kun la priskribo de serĉanta persono, sed ankaŭ kun tio kion ĝi atendas de ebla partnero. Tiujn kvar tipojn ŝi nomas : *la skolto*, *la konstruanto*, *la regulanto* kaj *la intertraktanto*.

Ĉe la *skolto* dominas *dopamino*. Skoltoj ŝatas ŝanĝojn kaj aventurojn kaj havas grandan malsaton je novaĵoj. Ili estas kreivaj kaj scivolemaj. Ili havas senliman energion, estas vastspirita kaj impulsivaj. Fojfoje iliaj reagoj estas malmulte antaŭdireblaj kaj ili ŝajnas eĉ malfindindaj. Ili daŭre strebas al libereco kaj sendependa vivo. Ili malfacile parolas pri siaj sentoj kaj havas ofte malmulte da sinkono.

La *konstruanto* estas pelata de *serotonino*. Ĝenerale konstruantoj estas ordemaj, respektas aŭtoritaton kaj estas lojalaj. Ili ŝatas certecon kaj estas tre tradiciemaj, singardaj kaj trankvilaj. Faktoj gravas por ili, kaj ili ŝatas gardi la kontrolon super la aferoj. Ili ofte estas gvidantoj. Tial ili ofte ŝajnas pedantaj kaj kritikemaj. Konstruantoj ŝatas skemecan rutinon kaj estas planantoj. Ili aprecas precizecon kaj detalojn kaj pensas paŝmaniere.

Regulanto estas ankaŭ nomata *testosteronbombo*, kio tuj pensigas pri rezultemo. Regulantoj ne ŝatas saltadi ĉirkaŭ afero, sed tuj rekte

*Met de hartelijke groeten van
Kun la koraj salutoj de*

KBC-Bank Hechtel

Rode Kruisplein 5
B-3940 Hechtel
Tel. 011-73.02.20
Fax 011-73.02.21
hechtel@kbc.be

diras pri kio temas. La regulanto analizas kaj pensas logike, ne kondamnas kaj ne troigas. Ili povas esti obstinaj kaj postulemaj, kaj iam perdiĝas en difinita hobio. Se regulanto koleras, li vere koleras, kaj oni ofte ricevas tre rektajn kaj eĉ krudajn respondojn. Li ankaŭ malfacile parolas pri siaj sentoj.

La sentoj de *intertraktanto* estas nutrataj de *estrogeno*. La tial nomatajn virajn kvalitojn oni trovas ĉe la regulanto. La tipe virinajn kvalitojn oni vidas ĉe la intertraktanto. Intertraktantoj estas homoj kiuj ofte okupiĝas per siaj sentoj. Oni ofte nomas ilin hezitemaj kaj nai-vaj. Ili reagis empatie, ofte estas romantikaj kaj rapide enamiĝas. Ili volas ofendi neniun kaj tial ofte ŝajnas tromultvortaj. Intertraktantoj havas riĉan fantazion kaj facile parolas.

Eble vi ne rekonas vin en unu el tiuj tipoj. Tio estas normala. Ĉiuj havas plurajn tipojn en si. Sed ĝenerale ni havas du pli fortajn tipojn. Tiam ni parolas pri primara kaj sekundara tipo. Ambaŭ estas la aksoj de nia karaktero kaj ludas gravan rolon ĉe la elekto de partnero.

(Laŭla la interreto)

Nia rakonto : Malagrabra viro (4)

Ons verhaal : Een onaangenaam man (4)

Venis muziko. Tri damoj kun longaj retikuloj, ruĝaj rubandoj sur la kufoj, oranĝaj teksaĵetoj ĉirkaŭ la koloj kaj antaŭtukoj kun profundaj poŝoj kun fakoj. Iu larĝa, lentuga Sapfo kun alta harpo en la mezo, kaj du tanaj virinoj kun manoj plenaj je diamantoj, kiuj ludis violonon.. "Jen tri amindaj gracioj," ekridante diris Nurks sufiĉe laŭte por permesi al longa prokurista skribisto kunridi, kvamkam tiu ĉi sidis pli for de li ol la tri gracioj. La kordoludo komenĉiĝis. De tempo al tempo Nurks metis fingrojn en la orelojn, kio ne povis kuraĝigi la tri

artistinojn. Ankaŭ ili sciis, ke sia muzikado ne estis tre bela kaj ankaŭ deziris nenion alian ol dekcendan moneron aŭ pencon de ĉiu aŭskultanto kaj iom da pacienco. La violonoj haltis per forta skrapo, kaj la harpistino ekkantis per iom raŭka voĉo, kaj ĝuste la dudek-trian fojon en tiu memorebla mateno, la tiam jam malnovan, sed ankoraŭ ĉiam trenantan francan kanton "*Fleuve du Tage*"²

"Ba ! Kiel malbele ŝi kantas," sonis tra la emociaj vortoj de la romano el la buŝo de Roberto Nurks, en kies kapon certe neniam venis la penso, ke ankaŭ malriĉa virino povus havi vantecon.

La kanto plu resonis sen ia ĝeno, tiel ke la retikulo povis esti malfermitajpor aperigi la konatan ruĝe lakitan telereton kun la brila rando. Mi estus metinta guldenon sur ĝin, se la kantistino ne estus petinta Nurks. Sed mi povis fari nenion pri tio : mi donis do nur dekcendan moneron.

"Kiom da oktavoj vi povas kanti?" li demandis ŝin ridaĉante, sed samtempe metante kvin-cendan moneron sur la telereton : tia li estis.

Ankaŭ en komerco oni devas akcepti la salan monon.

"Dankon, Sinjoro," diris la harpistino kun mallevitaj okuloj, kaj plu iris al la viro kun la ŝirita pantalone.

Intertempe la longa prokurista skribisto estis ŝanĝinta sian lokon kaj hazarde sidis nun ĉe tableto, kiun la virtuoziĝo jam preteriris.

Intertempe la violonistinoj gaje plu ludis. Mi ne scias, ĉu oni donis pli milde aŭ pli avare pro tio. Nun la damoj ankoraŭ ludis tre mallongan, tre rapidan triadon, post kio la damoj mallevi la okulojn, movis la lipojn, kliniĝis kaj foriris. Nun sola klarnetisto sen ĉapelo kaptis la okazon por aŭdigi ankaŭ siajn talentojn.

"En tiu ĉi lando oni ĉiam aŭdas malbonan muzikon," rimarkis Nurks.

"Ho, mi trovas ĝin tre gaja," mi diris.

"Jes," li diris, fikse rigardante min, "jes, sed mi kredas, ke, por diri la veron, vi ne estas tre muzikema."

Nu, pro tiu lasta malafablaĵo oni ne devas nomiĝi Roberto Nurks. Al tio kredas sin rajtigita ĉiu kiu ludas hejme la unuan kaj unikan violonon, aŭ en ia orkestro la duan violonon kaj eĉ la trian, se ekzistus tria violono. Jes mi konis paŭkistojn, kiuj tiurilate estis la plej pertinentaj. Eĉ se oni estas iu, kiu dum koncerto metas manon sub la mentonon kun certa

² Rivero en Portugalio kaj Hispanio

majesto, fermas la okulojn kun profunda sento kaj, tute konfuzita, malfermas ilin nur ĉe fermato, kvazaŭ oni venus el alia mondo (el la mondo de la imago, ekzemple) ; aŭ se oni batus tie kun certa saĝeco la mezuron per la faldita afiŝo aŭ glaceigita indekso ; aŭ eĉ se ĉe reveno de la temo de granda muzikverko oni havus la inklinon produkti nervozan ridon, kiu dirus kun telegrafa klareco : "Ni estas denove hejme !" Aŭ eĉ se oni havus la postulatan kapablon dekreti kun fatale malsuprentiritaj brovoj kaj tre duba kapskuado : "Tro malmulte da metodo." Aŭ eĉ se, povante distingi klasiĝan muzikon de la romantika, oni dirus : "Mi tamen preferas aŭdi Lafont aŭ Beriot al Eichhorn aŭ Ernst" ; mi dirus : eĉ se oni kopiis nur unu solan paĝon da muziko, eĉ se ekipita per ĉiuj tiuj muzikaj meritoj, oni ne havus la kompetentecon malestime rigardi la universon kaj deklari en la vizaĝoj de ĉiuj ceteraj kreatuloj, se ili kuraĝas diri ion pri la dia muzikarto, ke ili ne havas muzikan talenton. Koncerne tiun insolentecon la muzikistoj, kornistoj, sakflutistoj, kordopinĉistoj kaj tamburistoj superas la artistojn de ĉiuj aliaj fakoj. Neniu pentristo, kiam vi enirus lian atelieron kaj dirus ion pri pentraĵo lia aŭ aliula, ĉu prave ĉu malprave, havus la malĝentilecon diri al vi : "Mi ne kredas, ke la sinjoro komprenas multe pri arto." Neniu aŭtoro, al kiu honesta viro esprimus sian opinion pri romano, poemo aŭ disertacio, kuraĝus demandi lin, ĉu li havas bonan guston kaj sanan juĝokapablon. Sed muzikistoj ! Koncerne sia artfako, ili alproprigis al si la saman malafablecon, kun kiu naskiĝis mia kuzo Nurks, kaj mi renkontis junulojn el la plej civilizitaj rondoj, *every inch gentlemen*, kiuj koncerne tiun ĉi punkton estis tute neelteneblaj.

Mi pensas, ke mi devas ne plu menci mian kuzon. Se mi pripensas la aferon, mi apenaŭ scias, de kie alblovigis al mi tiu temerareco prezenti lin al vi. Mi do rakontos al vi, kiel ni tagmanĝis ĉe la honora tablo en "La Blazon-armilo de Amsterdamo". Kiel li duonlaŭte flustris pri la ekonomio de kelkaj simpluloj, kiuj, kontraŭ la regularo de la drinkejestro mendis duonan botelon da vino por si ambaŭ, poste minacis kaŭzi al si indigeston manĝante supviando, kiu estis servita post la supo, konvinkite, ke ne venos alia viando ; kiel lia rigardo kripligis la brakon de digna sinjoro kun pudrita kapo, kiu tranĉis, kompreneble ne tre lerte, ledecan kokinon per malakra tranĉilo ; kiel li rigardis fraŭlineton, kiu estis vidinta

ankoraŭ nenion de la mondo kaj sidis fronte al li, tiel ironie ke ŝi ekhavis la ideon, ke ŝi manĝas maldece tro multe, kaj tial komencis danki pro ĉio, kiu estis alportata poste, konvinkita, ke ŝi malpurigis ŝin manĝante, kaj jam rigardis sin en spegulo por vidi, kie ŝi malpurigis sin. Kiam ni ankoraŭfoje faris promeneton sur la Cervovojo post la manĝo, mi multe timis, ke li ricevos baton per pluvombrelo de unu el la blujakaj metiistoj, kiuj antaŭeniris per grandaj paŝoj, tenante ĉe la brako amindajn, amantajn kaj amatajn servistinojn, kiuj portis nigrasilkajn ĉapelojn kaj brunajn ŝalojn kun palmoj kaj kies tualetojn li ne ĉesis primoki.

Post ĉiuj tiuj jeremiadoj ni sukcesis meti la bonan, amindan kaj afablan Roberton Nurks sur la diliĝencon ĉe "la Sonorilo"³. Ankoraŭfoje li metis la kapon tra la pordofenestro por krii al ni : "Estas nenio speciala !", eldiraĵo kiun liaj kunvojaĝantoj povis apliki al si mem. Tiam li forveturis. Kune mia amiko kaj mi ankoraŭfoje promenis tra la Pordego – ĉar mi ankoraŭ ĉiam nomas tiel la kradon kun ĉiuj harlemano kiuj ankoraŭ estis konintaj la Pordegon. Kaj kiam ni vidis, rigardante trans la Kampon de la Leporoj⁴, la sunon, kiu estis subiranta sangeruĝa kaj transdonis sian belan koloron al la blankaj ŝaŭmsimilaj nubetoj, kiuj drivis kiel maldikaj vualoj tra la ĉielo, mi kuraĝis antaŭdiri al Boerhave belan lundon, kaj ĉe la agrabla perspektivo de floranta *Aristolochia Clematitis* kaj vivaj limakoj, li baldaŭ tute forgesis tiun malafablan parencon, kun kiu mi konatigis lin. *Hildebrand (1839)*

Aktivadoj de LEA en majo kaj junio

Atentu: ili okazos la antaŭlastajn ĵaŭdojn!

Ĵaŭdon, la 22-an de majo: Kantovespero. Paul Hotterbeekx akompanos la kantojn sur sia gitaro kaj kantos ankaŭ sola. La kunkanton gvidos Jan Doumen.

Ĵaŭdon, la 19-an de junio : Promeno tra la naturrezervejo " De Wulp " en Neerpelt, gvidota de Paul Hotterbeekx. Ni kunvenos ĉe Paul: Hamonterweg 169 B2, Achel. Ĉiuj esperantistoj estas bonvenaj!

³ Nomo de gastejo.

⁴ Herbejo, nuntempe parko.

Enhavo de tiu ĉi numero de ‘La Ponto’:

- Paĝo 2: Kolofono
Redaktore...
Plua historio de Esperanto (10) (*Støp-Bowitz kaj Isbrücker*)
- Paĝo 3: Novaĵoj el Esperantio:
- Ukrainio: La politika krizo kaj Esperanto (*Dima Ševĉenko*)
- Paĝo 4: - Hungario: Konkurso de Esperanto-muziko (*Lázlo Silvási*)
- Paĝo 5: Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (*Stefan Ma Gill*)
- Paĝo 6: Paroli kaj skribi helpe de i-Pado (*Het Brabants Dagblad*)
- Paĝo 7: La Universala Kongreso 2015 en Lillo (*Interreto*)
- Paĝo 8: Faru vian amteston! (*Interreto*)
- Paĝo 9: Nia rakonto: Malagrabla viro (4) (*Hildebrand*)
- Paĝo 10: Aktivaĵoj de LEA) en majoj kaj junio
-

Lernu Esperanton!

Kiom da fojoj ni ne staras en fremda lando kun frostinta lingvo, ne kapablaj paroli la lingvon de la tieaj homoj? La mondo bezonas supranacian, duan lingvon. Sola Esperanto ofertas vere demokratian solvon por tiu problemo, ĉar per ĝia ekonomia kaj politika neŭtraleco ĝi metas ĉiujn homojn sur egalan nivelon. Ĝi estas ne nur la plej facila lingvo en la mondo kaj la sola, kiu estas tute regula – ĝia grammatiko ne havas esceptojn –, sed ĝi pledas ankaŭ por egalaj rajtoj por ĉiuj popoloj. “Kiom da lingvoj oni parolas, tiom da fojoj oni estas homo”, diris imperiestro Karlo V. Tamen homo bezonas, ekster sia dialekto, nur du lingvojn: sian nacian lingvon kaj Esperanton. Esperanto ne volas anstataŭigi la naciajn lingvojn, kiel pensas multaj homoj, sed jes servi kiel komunikilo inter homoj, kiuj ne havas la saman gepatran lingvon.

Leer Esperanto

Hoe vaak staan wij niet in een vreemd land met de mond vol tanden, niet in staat de taal te spreken van de mensen aldaar? De wereld heeft een supranationale, tweede taal nodig. Alleen Esperanto biedt een echt democratische oplossing voor dat probleem, want door zijn economische en politieke neutraliteit plaatst het alle mensen op gelijke voet. Het is niet alleen de eenvoudigste taal ter wereld en de enige die volledig regelmatig is – haar grammatica heeft geen uitzonderingen –, maar zij pleit ook voor gelijke rechten voor alle volkeren. “Zoveel talen als men spreekt, zo vaak is men mens,” zei keizer Karel V. Nochtans heeft een mens behalve zijn dialect maar twee talen nodig: zijn nationale taal en Esperanto. Esperanto wil niet de nationale talen vervangen, zoals sommigen denken, maar wel dienen als communicatiemiddel tussen mensen die niet dezelfde moedertaal hebben.

Apprends l’Espéranto!

Combien de fois ne restons-nous pas bouche bée dans un pays étranger, incapables de parler la langue des indigènes ? Le monde a besoin d’une langue supranationale. Seul l’Espéranto offre une solution vraiment démocratique à ce problème, car, par sa neutralité économique et politique, il met tous les hommes sur un pied d’égalité. Ce n’est pas que la langue la plus simple au monde et la seule qui soit tout à fait régulière – sa grammaire n’a pas d’exceptions –, mais il plaide aussi pour des droits égaux pour tous les peuples. "Autant de langues on parle, autant de fois on est homme," a dit l’empereur Charles-Quint. Pourtant un homme n’a besoin, hors de son dialecte, que de deux langues: sa langue nationale et l’Espéranto, qui ne veut pas remplacer les langues nationales, comme pensent certains, mais servir de moyen de communication entre les gens qui n’ont pas la même langue maternelle.